

Raportoj de landaj sekcioj de ILEI por 2008

Kompilis: Stefan MacGill
Budapeŝto, aŭgusto 2009



Enhavtabelo

Albanio	3
Aŭstralio	4
Benino	6
Brazilo	7
Britio	11
Ĉinio	12
Danlando	12
Finnlando	13
Francio	14
Germanio	16
Hungario.....	18
Italio	23
Japanio.....	25
Korea Respubliko.....	26
Kroatio.....	27
Nederlando.....	28
Rumanio.....	Error! Bookmark not defined.
Svislando.....	30
Usono kaj Kanado.....	31

Premu CTRL kaj klaku eron el la enhavtabelo por salti al la koncerna paĝo.

Ĉi tiu PDF-dosiero estas serĉebla, do uzu la serĉilon en via PDF-legilo por trovi difinitajn erojn

Enkonduko

ILEI – la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – havas momente 32 landajn sekciojn. Ili laŭ nia regularo (punkto 7.3.7) devas ĝis la 31a de marto ĉiujare raporti al la sekretario pri la agado dum la antaŭa kalendara jaro. Pri 2008 raportis 19 sekcioj, do plenumo de 60%. Tiuj prezentoj estas de ĝenerala intereso kaj utilo, do la nova estraro akceptis la taskon publikigi ilin en ĉi tiu eksperimenta formo.

Por 2009 la celo estas atingi raportan nivelon de 100% kaj la estraro devigas sin ene de unu monato de la limdato aperigi la rezulton, por ke komitatanoj kaj membroj povu komenti ĝin ĝis kaj dum la konferenco en Kubo. Por sproni la reagemon ni proponos (sed ne devigos) uzon de normigita raport-folio.

Ĉi tiuj planoj kongruas kun la deziro apliki maksimuman malfermitecon en ligaj aferoj. Ni rete publikigos ĉiujn dokumentojn kiuj povos interesi la membraron aŭ la esperantistaron. Plia deklarita celo estas intensigi la kontaktojn kun la sekcioj kaj iliaj komitatanoj – pli da informfluo, pli da konsultiĝo kaj regula reta voĉdonigo de la komitato, tiel ke ĝi fariĝu ĉiam pli tutjara kaj demokrata organo. La reto permesas al ni partoprenigi multe pli da komitatanoj ol tiuj ne tiom multaj, kiuj sukcesas atingi niajn konferencojn – tipe malpli ol duono de la principe permesebla nombro. Sur la lasta paĝo vi vidas ke el 52 principe eblaj komitatanoj estas nomumitaj 41 (78%). Ĝis la konferenco estis nomumita 36 (69%), kaj fizike ĉeestis en Krakovo inter 24 kaj 26 validaj voĉoj. (49%) Sekve, urĝa tasko, jam survoja, estas la kompletigo kaj aktivigo de la komitato – unue per pli intensa komunikado kaj due per fortigita sistemo de komisionoj, kiel priskribita en la ĉefartikolo en numero 2009/3 de nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR).

Ni invitas vin – ĉu tra via sekcio, ĉu tra komisiono, ĉu persone, partopreni en la liga vivo kaj kontrbui laborfortojn. Inspiriĝu el la sekvaj raportoj! Bonan legadon

Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI

Albanio

La albana sekcio de ILEI dum la jaro 2008 sin okupis ĉefe en du kampoj: instruado kaj propagando.

La konstantaj lernokursoj rektaj kaj perkorespondaj okazis en Tirana, Lezhe, Kukës kaj Pogradec, sed la nombro de aliĝintoj iom malpliigis (entute estis nur 12). Ĉi-rilate influis ankaŭ la fakto ke la Albana Ligo de Esperantistoj ankoraŭ ne renovigis sian leĝan registriĝon ĉe la juĝejo, kio ebligas la stampiĝon de diplomoj post la fino de la lernokursoj.

De septembro ĝis novembro 2008, nia Sekcio venigis en Bydgoszcz (Pollando) 16 pliajn studentojn novajn por sekvi la tian konstantan trijaran kurson pri turismo uzante kiel laborlingvon ankaŭ Esperanton. Bedaŭrinde parto de la studentoj, kiel okazis ankaŭ antaŭe, ne daŭrigis la studadon ĝisfine, malgraŭ la helpo de niaj sekcianoj diversmaniere. En Bydgoszcz, kiel sciante, albanoj studas regule ĉiujare ankaŭ Esperanton ekde 1997. Kutime ne estis problemoj je vizakirado. (Lastjare nur unu studento ne sukcesis akiri la polan vizon).

Ĉiun duan monaton aperis nia reta Bulteno plurdekpaĝa kio disvastiĝas ne nur enlande sed ankaŭ eksterlande. Almenaŭ dufoje oni publikigis artikolojn en la tagĵurnalo "Agon" (Frutagiĝas) pri aŭ koncerne Esperanton.

Du membroj de la sekcio sukcesis partopreni ankaŭ UK en Roterdamo.

La Sekcio delonge ne okazigis siajn elektojn pro la fakto ke la estro, s-ro Vasil Pistoli loĝas en Usono, sed ĝi pagis regule la membrokotizon.

Raportis Bardhyl Selimi, sekretario

03/06/2009



Membroj fine de 2008: 6 – ĉiuj retaj.

Komitata rajtigo: 1

Nomumita: 1 (Shaban HASANI)

La sekcio eldonas regule jam de jaroj retan bultenon.

Aŭstralio

La plej grava evento por Aŭstralio okazas en la somero, je la komenco de la jaro.

Tamen en 2008 okazis la unua Oceania Kongreso kaj la 5a kunkongreso de la Aŭstralio kaj NovZelanda Asocioj en Aŭklando, NovZelando. Partoprenis 59 personoj plejparte el Aŭstralio kaj NovZelando sed ankaŭ venis partoprenantoj el Slovakio, Francio, Italio, Svedio, Malajzio kaj ses el NovKaledonio kiuj tre ĝuis lerni interalie per babilado ĉe la manĝotablo kaj dum tre belaj ekskursoj.

La kongreso enhavis kursojn preskaŭ ĉiutage je tri niveloj kun internaciaj instruistoj Trevor kaj Katja Steele el Aŭstralio kaj Stano Marĉek (Redaktoro de Esperanto) el Slovakio. La progresantoj lernis kun Stano Marĉek, utiligante lian interesan libron kaj materialojn sub la titolo 'Esperanto per Rekta Metodo'. Trevor Steele gvidis grupon da kompetentaj studantoj per lia fascina romano "Kaj staras tre alte", dum Katja Steele tre bone instruis vortojn interalie per kantoj al la 4 infanoj de familioj ĉeestantaj. Ĝi estis tre agraba kaj sukcesa internacia evento

En Aŭstralio mem nun estas tre malfacile fondi regulan kurson por plenkreskuloj, sed Dianne Lukes kaj Sandra Connors instruis 8 personojn dum 8 semajnoj en Toowoomba, Kvinslando kaj Robert Budzul daŭre kuraĝigas viglan grupon de gejunuloj en Hobarto, Tasmanio. Kvankam troviĝas almenaŭ dek kvin kompetentaj instruistoj ili plejmulte helpas individue al la perkorespondkursanoj. Junaj interesatoj kiuj sin prezentas plejofte preferas lerni per la kursoj trovataj en Interreto.

La korespondaj kursoj de AEA, tre bone prizorgataj de s-ino Hazel Green, ne aldonas multon al instruado en Aŭstralio, sed ili estas tre utilaj por tiuj kiuj ŝatas havi librojn por neĉeesta kurso, anstataŭ lerni nur per interreta kurso.

Dum 2008, la korespondkursara servo vendis kurson 1, bazitan sur la unuaj dek lecionoj de "Esperanto by Direct Method" de Stano Marĉek al 11 homoj. 2 el tiuj komencis kurson 2, uzante la ceterajn 12 lecionojn de "Esperanto by Direct Method." Unu homo aĉetis "Jen nia mondo", de J.C.Wells, (nia "malnova" kurso du). 1 homo aĉetis novan ekstran kurson uzantan "Detektivu pri la krimo de Katrina", de Sten Johansson. 2 homoj aĉetis "The Progressive Course" kiu uzas libron de M.C.Butler, "Step by Step". 5 kursgvidantoj en 5 provincoj estas haveblaj por helpi studantojn, plejparte en la sama provinco.

Malgraŭ la situacio pri kursoj, la ILEI-sekcio tre entuziasmiĝas pri la evoluo de la projekto de Penny Vos, "Australian Lote (Language Other Than English – Lingvo krom la angla) - Kiel sukcesi pri larĝa kaj profunda kompetenco pri lingvolernado en la lernejo". Kun helpo de AEA ŝi sukcesis eldoni tre informan kaj konvinkan libron kiun ŝi disdonis al politikistoj, universitataj profesoroj, instruistoj kaj aliaj konvinkindaj gravuloj. Kiam vi ricevos ĉi tiun raporton, ni atendas pozitivan reagon kaj daŭre informas nian popolon pri la valoraj eblecoj per la instruado de Esperanto. Intertempe Esperanto estis instruata ĉe Treetops Montessori Lernejo en Okcidenta Aŭstralio, de Peni Vos ĉe baza lernejo en Canelo, NSK kaj de Gordon Coleman ĉe la baza lernejo Hackham South, SudAŭstralio.

Aŭstralio Esperanto-Somerkursaro 2009 jam okazis en Sidnejo kie partoprenis proksimume 70 personoj el Aŭstralio, NovZelando, NovKaledonio, Francio, Germanio, Svisio, Italio kaj Rusio. La instruistoj, inkluzive de Atilio Orellana Rojas el Nederlando kaj Monique Arnaud el Francio, estis Trevor Steele kaj Sandor Horvath el SudAŭstralio

kaj Penny Vos el NovSudKimrio. Ŝi tre bone prizorgis kaj instruis kvin infanojn. Instruado okazis ĉiumatene je kvar niveloj. En la posttagmezo okazis belaj ekskursoj per klimatizita aŭtobuso, jarkunveno de la ILEI-sekcio, kaj vespere viglaj distraĵoj tre diversaj.

Post plani kaj plenigi la esperojn de la unua AESK en Sidnejo ni senhezite volas ke multaj abonantoj de IPR nun komencu revii kaj informiĝi pri sia vizito al AESK 2010, de la 10a ĝis la 23a de januaro, ankaŭ ĉe tre oportuna bone ekipita International House, Sidnejo. Ni promesas internacian kaj tre kompetentajn naciajn instruistojn, amikajn internaciajn kunulojn, ĉambrojn por unu persono, ampleksan manĝmenuon, varman someran veteron, ĝojon, amikiĝon kaj plikompetentiĝon en nia lingvokono de Esperanto.

Jennifer Bishop, ILEI-sekciestro.
esperanto@education.monash.edu.au
Marto 2009



Membroj fine de 2008: 8 – el kiuj 4 retaj.
Komitata rajtigo: 1
Nomumita: 0

Retejo: <http://velado2.tripod.com/id28.html> (en la angla).

Benino


Por partopreni la seminarion kaj la ILEI-konferencon 2008, la sekcio prizorgis la sendon kaj la korektadon de kursoj "Gerda malaperis". Por okazigi trejnseminaron por instruistoj la prezidanto de la sekcio korespondis kun la fondaĵo Hans cele esti subvenciita. Bedaŭrinde la planita seminario ne plu okazis kaj estas prokrastita. La konsciigo de homoj pri la ekzisto de la ILEI sekcio en Benino rajtigis ĝin subskribi la konferencan regularon de sia prezidanto. Antaŭ kaj post la okazigo de la ILEI konferenco, la rondvojaĝo de **Vladka Chvatalova** estas organizita de la prezidanto de la sekcio. Ŝi gvidis kurson tra kluboj en foraj anguloj de Benino sub la gvidado de la prezidanto.

Dum la fizikaj estrarkunsidoj, la sekcio decidis elekti gravajn urbojn kaj mezlernejojn por semi la lingvon per informado kaj korespondado. Ni elektis la urbon Bohicon tra la direktoro CBDIBA, kiu jam ekkorespondis kun la prezidanto de la sekcio pri mondcivitaneco. La prezidanto disponigis al ili kelkajn materialojn pri la lernado. Krome, *sms* atingis la prezidanton celante instrui la lingvon en kelkaj anguloj de Porto-Novo "Adjohoun" fare de studentoj, kiuj aŭdis pri esperanto de **Gbètogo (Moses Okpa)** en Niĝerio. Alofa Karlo pretas transpreni la korespondadon kun la studentoj tie. La sekcio relanĉis sian rondviziton tra kluboj por apogi instruade kaj materiale kolektinte informojn ĉe la prezidantoj de ĉiuj kluboj. La estraranoj pristudis la lernomaterialojn kaj pli preferis la " **Cours Ferez**" ol la aliaj kaj baldaŭ dissendis al bezonantoj la unuagradan kurson. Aldone "Cours de langue internationale pour esperanto" laŭ la rekomendo de Renato.

Ĉi-jare la sekcio ricevis subvencion de 10.000 fcfa, unuafoje depost sia naskiĝo. La sumo apenaŭ kovros la vojaĝkoston de vizitontoj al kluboj. Tamen iuj estraranoj transprenis kelkajn elspezojn pro la sendependeco de la sekcio parolata de Renato Corsetti. Tiu lasta forte sopiris kunlaboradon inter la sekcio kaj la landa asocio.

La sekcio rondvizitis la klubon " **Pacaj Metiistoj**" en Lokossa kaj tri aliajn (**Nova sento, Sankta Harmonio** kaj **Monda familio**) en Kufo. La lasta vizito okazis decembre. Entute kvar kluboj estas vizititaj de la sekcio en la jaro 2008.

Informis:
François HOUNSOUNOU
Prezidanto de Benina ILEI Sekcio
<hounfranc@yahoo.fr>
24/04/2009



Membroj fine de 2008: 5 – ĉiuj paperaj.
Komitata rajtigo: 1
Nomumita: 1 (François HOUNSOUNOU)

Brazilo

La brazila sekcio plu funkciis sub la provizora gvidado de José Roberto Tenório (redaktanto de Brazilei), Joel Afonso Francisco (kasisto) kaj Conceição Rodrigues (helpanto). Signifan laboron ankoraŭ ne eblis prezenti en 2008. Sekvas do raporto pri niaj streboj iel kunlabori por la enlanda instrufako, laŭ niaj kapabloj kaj rimedoj.

Sekcianaro

En 2008 registriĝis 83 aliĝoj venintaj el 53 enlandaj urboj, laŭŝtate tiel distribuitaj: São Paulo: 50; Rio de Janeiro: 13; Minas Gerais: 10; Pará: 2; Santa Catarina, Alagoas, Paraíba, Goiais, Paraná, Rio Grande do Sul, Rio Grande do Norte kaj Distrito Federal: po 1. Pluan fojon, plej multaj aliĝoj plenumiĝis pere de reta aliĝilo.

Sekcia budo / prelegoj

Aĉeti esperantajn librojn, ĉefe importitajn, por multaj lokaj movadanoj ne estas facila afero. Tial, per tiu servo de la sekcio, partoprenantoj de E-aranĝoj povas akiri esperantajn novaĵojn kaj nepraĵojn kaj krome informiĝi pri la publikigaĵoj kaj agadoj de la sekcio. Dum 2008 okazis deĵoro en la sekcia budo ĉe jenaj Esperanto-aranĝoj:

19-20/jan, en la urbo Bauru, en ŝtato San-Paŭlo (SP)

Regiona E-Renkontiĝo, organizita de Baurua Esperanto-Societo, partnere kun la loka fakultato pri administrado; la eventon partoprenis ĉ. trideko da esperantistoj. Krom budo-deĵorado, la sekcio prezentis la prelegon "Kiel virtuale akceli lingvolernadon per principoj de rolludado".

03-04/feb, en la urbo Lorena/SP

1-a eldono de BEL-konferencoj, organizita de Brazila Esperanto-Ligo, en kiu partoprenis ĉ. kvindeko da esperantistoj.

30/mar, en la urbo São José dos Campos/SP

71a Renkonto de Esperanto en la Paraíba Valo, organizita de la loka esperantistino Eni Alvim de Oliveira partnere kun la regiona universitato - Univap, kun la ĉeesto de pli ol 70 esperantistoj. Krom budo-deĵorado, la sekcio prezentis la prelegon "Didaktika virtuala itinero por kursgvidantoj kaj lernantoj de Esperanto".

17-18/maj, en la urbo Tririveroj, en ŝtato Rio de Janeiro

19-a E-Renkontiĝo de la Ŝtato Rio de Janeiro, en kiu ĉeestis 128 esperantistoj. Krom budo-deĵoro, la Sekcio prezentis la prelegon "La Komuna Eŭropa Referenckadro kaj la loka E-grupo: adaptiĝo cele al unueca lingvotestado"

22/jun, en la urbo San-Paŭlo/SP

20-a Esperanto-Renkontiĝo de la Urbo San-Paŭlo (ERUSP), organizita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, en kiu ĉeestis ĉ. okdeko da esperantistoj. Krom budo-deĵoro, la Sekcio prezentis la prelegon "Enlandaj kaj internaciaj ekzamenoj: du apartaj mondoj"

31/aŭg, en la urbo Taubaté/SP

73-a Renkonto de Esperanto en la Paraíba Valo, en kiu ĉeestis ĉ. trideko da esperantistoj

10-12/okt, en la urbo Lorena/SP

3-a Esperanto-Kongreso de la ŝtato San-Paŭlo, organizita de Lorena E-Klubo aŭspicie de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, en kiu ĉeestis ĉ. 100 esperantistoj

Revuo Brazilei

Kvar eldonoj de la sekcia organo Brazilei (n-roj 6, 7, 8 kaj 9) eldoniĝis kiel planite. La revueto estis senpage disdonata al la anoj de la Sekcio (papera versio) kaj al enlandaj kaj alilandaj instruamantoj (PDF-versio). Intervjue pliriĉigis ĝian enhavon, en 2008, i.a. la redaktoro de edukado.net, d-ino Katalin Kováts, el Nederlando (Brazilei_06); la lingvisto, mag. Emerson Werneck el Braziljo/Brazilo (Brazilei_07); la eksa akademiano, prof-ro Sylla Chaves (Brazilei_08), el Rio/Brazilo; kaj la eksa prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, el Italio (Brazilei_09). Kune kun la sepa n-ro de Brazilei la sekcianoj ricevis ekzempleron de la broŝureto "La Komuna Eŭropa Referenckadro" (donaco de UEA pere de edukado.net).

Partnereco

Kun granda honoro ni akceptis la inviton por partneraj laborrilatoj kun la porinstruista paĝaro edukado.net. En la okazo, mi skribis al la legantoj de Brazilei: *"(...) se ni aktive reagos al tiu interŝanĝo de spertoj, certe praktikaj rezultoj estiĝos; male, se ni pasive travivos tiun inviton, ni povos eventuale ĝui nur la moralan apogon"*. Kelkaj praktikaj rikoltoj ja registriĝis en 2008, inter kiuj menciindas: la importado, por la retbutiko de la sekcio, de la lerniloj "Poŝamiko" kaj "Ĉu vi aŭdis... ke?", ambaŭ verkitaj de d-ino Katalin Kováts mem; la afabla donaco de 100 ekzempleroj de la broŝureto "La Komuna Eŭropa Referenckadro", fare de la Ĝenerala Direktoro de UEA, s-ro Osmo Buller, danke al la interveno de d-ino Katalin Kováts; la aperigo de artikoloj de Brazilei en la retejo edukado.net; la skribigo por testado de la novaj internaciaj ekzamenoj de UEA, fare de la sekcio kune kun aliaj enlandaj E-grupoj; kaj invito partopreni en la pedagogia metiejo aranĝita de edukado.net, en la amisterdama UK (bedaŭrinde pro la enlanda plurtaga poŝta striko ne eblis ekspedi la materialon pri Brazilei por la tiea eksponado kaj disdonado).

Tiuj riĉaj spertoj entuziasmigis nin, sed ankaŭ multe helpis nin pli bone kompreni kaj konsideri la dimension de la agado de la sekcio: la kunlaboro povas esti interlanda, sed la celaro nepre enlanda.

=====

Pririgado de aliaj koncernaj enlandaj aranĝoj en 2008

Trejnado por kursgvidantoj

La 27an de aprilo, en la urbo Campo Grande/RJ, okazis la 11-a Trejnaranĝo por kursgvidantoj, organizita de EKOR (Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono). Interalie, oni pritraktis jenajn temojn: "Retiriĝemo kaj psikologiaj aspektoj en homaj interrilatoj", "Kiel instrui Esperanton al infanoj", "Kiel intrui per didaktikaj ludiloj" kaj "Kiel prepari kaj organizi lecionojn".

Subĉielaj lecionoj

Paulo Sergio Viana, el Lorena Esperanto-Klubo, en la landinterno de San-Paŭlo, proponis al la tieaj lernantoj kaj klubanoj porokazajn *subĉielajn lecionojn*. Kiel li mem raportas: "Por malenuigi nian konversacian klason, ni decidis plani vizitojn al proksimaj vidindaĵoj - kun triobla celo: lerni novajn vortojn, ĝui klerigan turismon kaj... amuziĝi".

La grupo jam okazigis diversajn promenojn kun kuraĝigaj rezultoj.
En 2008 registriĝis jenaj lernekskursoj:

- Marte: vizito al Baziliko de Nia Sinjorino Aparecida, en la samnoma urbo.
Maje: ekskurso al Ŝtono Marcela (1.830 metrojn super la marnivelo!) en la urbo Cunha/SP.
Julie: vizito al Domo de monahxo Galvão, en la urbo Guaratinguetá/SP.
Aŭguste: vizito al Muzeo de la Portugala Lingvo, en la urbo San-Paulo/SP
Oktobre: vizito al "Bieneto de la Flava Beko", en la urbo Taubaté/SP.

Tiu iniciato instigis almenaŭ unu plian grupon, ankaŭ en San-Paŭlo, kiu okazigis kvar tiajn *subĉielajn lecionojn*: viziton al Pinakoteko, piknikon en parko, forstan ekskurson kaj viziton al bieneto.

Esperanto en la Bibliotekojn

Menciinda estas la bone konata kampanjo "Esperanto en la Bibliotekojn", fare de Kultura Kooperativo de la Esperantistoj, en la urbo Rio de Janeiro, sub la organizado de Aloísio Sartorato, kiu la 12an de marto 2008 anoncis la ekspedon de la 62-a libropakaĵo, kaj 9 monatojn poste (la 30an de decembro), la ekspedon de la 75-a libropakaĵo, informante plu, ke ĝis tiam ekspediĝis pli ol 800 verkoj al 64 enlandaj kaj 11 alilandaj bibliotekoj. La kampanjo komenciĝis en 2001 kaj estas monsubtenata de kelkaj esperantistoj.

Lernilaj lanĉoj

Marte, sub la eldonmarko de Brazila Esperanto-Ligo, aperis la 9-a eldono de la populara lernilo *Esperanto para principiante* (Esperanto por komencantoj) de Aloísio Sartorato. La libro unuafoje aperis en 1986 kiel fotokopiaĵo. Kvin jarojn poste la aŭtoro aperigis ĝin libroforme, kaj de tiam jam eldoniĝis 10 mil ekzempleroj de la lernilo. Laŭ la kalkulo de la aŭtoro, pli ol 11 mil homoj jam lernis per lia lernolibro. Li sprite demandas: kie estas tiuj lernantoj?!

Julie, okaze de la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto, eldoniĝis la unua titolo, el serio de kvar vortaroj fare de prof-ro Sylla Chaves, nome *Oportuna Poŝvortaro* (esperanta-portugala) kun 488 paĝoj kaj dek du mil kapvortoj. La aliaj eldonotaj verkoj temas respektive pri jenaj vortararanĝoj: portugala-esperanta; esperanta-portugala/portugala-esperanta; kaj esperanta-esperanta.

Esperanta leĝoprojekto

La 21an de februaro 2008, Senatano Cristovam Buarque proponis leĝoprojekton cele al enkonduko de Esperanto kiel elektebla studobjekto en ĉiuj enlandaj mezlernejoj. La projekto spicas la imagenon de plej multaj esperantistoj, kiuj revas pri instruado de la lingvo en lernejoj, sed apenaŭ entuziasmigas tiujn esperantistojn, kiuj revas pri evoluado de la lingvo unue en universitatoj kaj nur poste en la lernejoj. La leĝoprojekto sekvas sian vojon en la administra labirinto de la senata edukkomisiono.

Kursoj de Esperanto

Estas multaj enlandaj kursejoj (nur en la ŝtato San-Paŭlo estas 42 tiaj Esperanto-

grupoj), kiuj okazigas almenaŭ bazan kurson de la lingvo. Kontakti la kursestrojn aŭ kursgvidantojn cele teni ĝistadajn registrojn pri iliaj instruagadoj ne estas facila tasko. Plej multaj ne resendas demandaron. Kelkaj ne interesiĝas pri tiaj aferoj, kaj aliaj hontas sciigi, ke nur 2-3 lernantoj vizitadas la kurson. Laŭ propra sperto, ne konvenas insisti multe pri tiu demandaro, ĉar tio povos malhelpi eĉ pli la komunikadon. Ho ve, kiel komprenigi al tiuj hontemaj instruantoj, ke se la lernantoj de ĉiuj enlandaj kursejoj sidus en unu sola lernoĉambro, ili ne havus motivon por honti, sed por fieri!

Koncerne instruadon de Esperanto en universitata medio, kelkloke la rikolto ankoraŭ estas eksperimenta, sed aliloke ĝi burĝonas promesdone jam de kelkaj jaroj. Ĉiuj kursoj estas libere elekteblaj kaj nepoentdonaj.

Universitato de Cearao, en la urbo Fortaleza:

baza kurso kadre de la komuna kursaro, sub gvido de José Leite de Oliveira Junior
<http://www.esperanto.ufc.br/>

Universitato de Paranao, en la urbo Kuritibo:

Baza kurso, en pluraj tagoj kaj horoj, kadre de la komuna kursaro, sub gvido de Leonardo Janz kaj Mariza Riva de Almeida
http://www.celin.ufpr.br/cursos/ufpr_celin_esperanto.htm

Universitato de Sankta Katarino, en la urbo Florianopolo:

Libera baza kurso por triaĝuloj, sub gvido de Antônio Felix da Silva.
<http://www.neti.ufsc.br/atividades.php>

Universitato de Braziljo (UnB), en la fedarala distrikto:

Baza laŭ 1a kaj 2a niveloj, dufoje en la semajno, kadre de la komuna kursaro, sub gvido de Herbert Andreas Welker kaj Paulo Nascentes
http://www.unb.br/administracao/decanatos/interfoco/inic_esperanto2.php

Pontifika Universitato Katolika de Kampino (PUC-Campinas), en Kampino:

Baza kaj progresiga en pluraj tagoj kaj horoj, kiel libere elekteblaj kursoj, sub gvido de Ricardo Dias Almeida kaj Rafael Henrique Zerbetto.
<http://unicamp-esperanto.blogspot.com/http://www.puc-campinas.edu.br>

José Roberto Tenório
la 9an de junio, 2009
Nova sekciestro serĉata.



Membroj fine de 2008: 83 – 49 paperaj, 34 retaj.

Komitata rajtigo: 4

Nomumitaj: 0 – atendas enpostenigon de nova sekciestro.

Elstare bona Esperantlingva retejo kun filmeto el ViTub:

<http://ileibr.org/brazilei>

Britio

Kuraĝigi lernejojn adopti la projekton *Lingvolanĉilo* (*Springboard to Languages*) restas daŭre nia ĉefa agado; ĉio tiurilate bone progresas. Novaj kurseroj kaj afiŝoj aperas regule; la afiŝoj estas popularaj kun bazlernejaj instruistoj, kiuj aĉetas ilin por klasĉambra uzo (dum lingvaj foiroj).

Kursoj korespondaj kaj loĝigaj prosperas. Okazis por la unua fojo ĉi-jare 'Drondo' (= diskutrondo pri aktualaj temoj) organizita de d-ro Derek Tatton, la antaŭa estro de Wedgwood Memorial College, kie ni okazigas ankaŭ *Somera Festivalo* kaj *Ni Festivalu*, kaj du fojon jare kursoj porkomencantaj.

Vidu: <http://www.esperantoeducation.com/residential.html>

Eldoniĝis la libroforma porkomencanta kurso, *Elementary...!*, kaj komenciĝis la ĝisdastigo kaj eventuala represo de la malgranda libreto de Montague Butler, *Esperanto for beginners*.

Nia peto al la EU por financa subteno por projekto Comenius (*Springboard to Languages*) sukcesis. Brita, germana kaj hungara lernejoj kunlaboras por produkti 4-lingvajn opereton kaj DVD-on.

Grupo da britaj infanoj veturis al Herzberg por 5-taga vizito dum aŭgusto 2008. Ili gastis ĉe lokaj infanoj, kiuj lernas Esperanton kun Zsafia Kóródy kaj Otto Kern. La vizito estis tre sukcesa, kaj la germanaj infanoj vizitos Brition kune kun grupo da hungaraj infanoj (instruas Ilona Fedor) ĉi-aprile.

Anĝela Tellier, sekciestrino

09/02/2009

<angela@esperantoeducation.co.uk>



Membroj fine de 2008: 10 – 9 paperaj, 1 reta.

Komitata rajtigo: 1

Nomumita: 0

Hejmpaĝo:

Ĉinio

Pro ia kaŭzo ĉina sekcio de ILEI silentis dum kelkaj jaroj. Nek agadoj, nek membroj. En la jaro 2008 nia ĉeftasko estis multe kontakti kun ĉinaj esperantistoj por preparado de la sekcio kaj entute varbis 14 membrojn al ILEI.

Dum tiu tempo, ni gvidis kelkajn E-kursojn en Universitato, ankaŭ en elementa lernejo, kie ni ĉef-laborantoj trejnis 3 junajn esperant-instruistojn por 10 tagoj, invitita de la lernejestro. Por ke altigu nivelon de la E-instruado kaj interŝanĝu spertojn inter E-instruistoj, ni decidis okazigi seminarion pri E-instruado en 2009.

Ĉina sekcio de ILEI
Prof. Dr. Gong Xiaofeng
Arko.gong@qq.com
Xfgong2002@163.com

[La ĉina sekcio dum kelkaj jaroj estis en transira fazo. Ĝi nun anoncis 20 membrojn por 2009, la estraro rekomendas al la komitato, ke ni konsideru la reviviĝintan sekcion kiel la daŭrigon de la antaŭa. Nirestarigos ĝin en nia sekcia listo]



Membroj fine de 2008: 0
Komitata rajtigo: 0
Nomumita: 0

Danlando

La lernolibro por komencantoj de Stano Marcek «Rekta metodo» en dana versio estis eldonita, kaj sukcese vendita al kursanoj de niaj kluboj. ILEI membroj de nia sekcio partoprenis en la redaktado de la dana versio. Pluraj ILEI membroj daŭre instruas al kursanoj de Kopenhago, Odense kaj Ålborg.

Arne Casper
23/03/2009
<arnecasper@dbmail.dk>

Membroj fine de 2008: 15 – ĉiuj paperaj.
Komitata rajtigo: 2
Nomumitaj: 2 (Arne CASPER - Tara GREGERS)



Finnlando

Membraro

Fine de la jaro estis 17 jarmembroj. Prezidanto/sekciestro estis Carola Antskog, vicprezidanto Aini Vääräniemi kaj sekretario Sylvia Hämäläinen.

Kontaktoj kun ILEI

Komitatanoj de ELFI en ILEI estis sekciestro Carola Antskog kaj sekretario Sylvia Hämäläinen. Raita Pyhälä estas kunlaboranto kaj Sylvia Hämäläinen peranto de Juna amiko.

Pri la agado

La cirkulero Interligilo estis sendita al la membraro en du numeroj. En pluraj lokoj okazis semajnfina, kelktaga aŭ unusemestra kurso, kiun gvidis membro de ELFI. La taskojn de la koresponda kurso de Instituto de Orivesi kontrolas Raita Pyhälä. Tiina Oittinen estis la kursgvidanto de la Valamo-kurso. Carola Antskog prizorgas la retliston E-ku en kiu estas kolektitaj scioj pri esperantokursoj en Finnlando.

Krome

Fabelkonkurso (Esperanto-branĉo) okazis la naŭan fojon en Taivalkoski aŭspicie de UEA. Ĝin aranĝas la literatura-kultura edukejo Päätaalo-instituto kaj la vilaĝsocieto de Metsäkylä iniciate de nia membro Aini Vääräniemi. Du ELFI-anoj estis ĵurianoj.

Teuvo Alavillamo estas lingvohelpanto en lernu! kaj korektas la korespondekzercojn en la kurso Ana Pana 1 kaj respondas al demandoj.

Sekretario Sylvia Hämäläinen
Marto 2009

Sekciestro: Carola ANTSKOG <cantskog@kolumbus.fi>



Membroj fine de 2008: 17 – 9 paperaj, 8 retaj.
Komitata rajtigo: 2
Nomumitaj: 2 (Carola ANTSKOG, Sylvia HÄMÄLÄINEN)

Hejmpaĝo: http://www.esperanto.fi/elfi_eo.htm.
Esperanta kun salto al finna kaj sveda paĝaro.

Francio

La estraro:

Dechy Michel, sekciestro; Catil Jo, vicsekciestro; Riste Gaston, sekretario; Houvriez Maryvonne, vic-sekretariino; Arnaud Monique, kasistino

GEE kiel sekcio permesis al ILEI havi 31 membrojn. Okazis 2 jarkunsidoj de ILEI – en Roterdamo, Nederlando dum la U.K, kaj en Porto-Novu, kie partoprenis 3 francoj.

Ĉar ILEI perdis siajn operaciajn rilatojn kun Unesko, Jean-Pierre Boulet proponis starigi atelieron en Benino por verki libreton laŭ la Uneska serio. (projekto DANIDA-UNESKO). Tiu ateliero bone funkciis kaj nun la libreto pretas. Dum la ILEI-Konferenco en Benino, Renée Triolle regule organizis konversaciajn rondojn kaj elektis gravajn temojn. La mono de la aŭkcio en Martigues ebligis dispartigi monon al homoj en Benino, duono por klubo de Lokassa kaj duono por partopreno de virino en la ILEI-Konferenco.

Reprezentantoj de GEE kaptis la okazon propagandi por Esperanto dum la sekvaj eventoj en lernejoj :

- La Internacia Tago de la Paco , 21-an de septembro
- La Eŭropa lingvotago, 26-an de septembro
- Tago de neperforto la 2an de oktobro, kun aliaj asocioj kun infanoj kaj plenkreskuloj
- Tagoj de la Infanaj Rajtoj, 20-an de novembro kaj sekvantaj semajnoj: ekspozicioj.
- bonega laboro de la respondeculino de la klubo, panelojn kun diversaj mesaĝoj skribitaj en la lingvo parolata en la lando mem kaj en esperanto kiel ponto-lingvo.
- La Tutmonda Tago de la Homaj Rajtoj, 10-an de decembro
- La Tutmonda Tago de la Patrino Lingvo, 21-an de februaro,
- La Tago de la Virinoj, 8-an de marto, kun granda sukceso en La Ciotat.
- La Tago de Eŭropo, 9-an de majo

Pri la tago de neperforto, vidu:


<http://picasaweb.google.fr/Esperanto.Indre/TagoDeNeperfortoLa2anDeOktobro2008EnChateaurouxFrancio>

De pli ol unu jaro, okazis renkonto sur la reto, tra lokaj gazetoj kaj per radio, de du geesperantistoj (Alice kaj Cedric) kiuj vojaĝas kuŝbicikle tra Eŭropo kaj Azio. Ili interŝanĝas informojn kun infanoj kaj junuloj de esperantistaj kluboj kaj kun klasoj kaj lernejoj pri diversaj temoj. Ili eklernis esperanton dum nur 6 monatoj antaŭ ol foriri. Vidu ilian retpaĝon ĉe « Portrait de Planete ».

GEE monsubtenas la projekton de la libreto : « Rakonto pri tarfolioj el Afriko ».

Gee-anoj gvidas kursojn, organizas staĝojn, finsemajnajn kursojn kaj ekzamensesiojn. Enketo pri Esperanto en Francio por statistikoj montras, ke ofte lernejoj ludas gravan rolon. Partoprenas en la Instruista Kursaro en Pollando Anne Jausions.

Okazis en Lille prelego pri Eo en la Universitato pri Libera Tempo de Lille (UTL), kaj atelieroj en tiu UTL(10 seancoj, 1h 30, 2 niveloj), krome prelego pri Eo , la 9an de majo, okaze de festo pri Eŭropo, en la " Chambre de Commerce" de Valenciennes. Okazis prezentado de Eo en Liceo Faidherbe (la plej granda en Lille), kaj en unuagrada lernejoj (4 seancoj kutime). En Greziljono, en Julio okazis studsesio 'Bildstrioj kiel lernolibroj', ĉefe Tinĉjo en Tibeto.



Membroj fine de 2008: 37 – 33 paperaj, 4 retaj.

Komitata rajtigo: 3

Nomumita: 1 (Dechy Michel, du pliaj nomumotaj)

Ĝisnunaj: Arnaud Monique, Houvriez Maryvonne).

Hejmpaĝo: Aperas mallonga mencio pri GEE ĉe:

<http://esperanto-france.org/association/adherents.html>

Germanio

Statuto:

Nova statuto estis akceptita kaj prezentita al la juĝejo. Jura enskribo de la asocio okazis en Hanovro, 01.02.2008. AGEI estas daŭre jure memstara kaj ricevis agnoskon pri komunutileco.

Estraro:

prezidanto: Zsofia Korody
vicprezidanto: d-ro Rudolf Fischer
kasisto, membroadministranto: Christof Krick
estrarano: Harald Schmitz
kasrevizoroj: Wolfgang Bohr, Karin Klose

Membraro:

La nombro de membroj restis stabila, kun ĉ. 90 membroj dum 2008 la plej granda landa sekcio de ILEI. La AGEI-estraro kaj komitatanoj esprimis sian malkontenton pro la kontraŭstatuta funkciado de ILEI, pro la neglektita, neregula raportado pri ILEI-buĝeto, financoj al la kotizpagantaj landaj asocioj.

Agado:

Instruado: partopreno en la internacia laboro lanĉita de la laborgrupo 'Lingvolanĉilo' Laŭ la kolektitaj informoj E-instruado estas en 15 lernejoj: en elementa nivelo 6, en meza 6, en supera 3. La plej multnombra grupo lernis en la bazlernejo de Günne: 50 infanoj.

AGEI donas organizajn, metodikajn konsilojn kaj helpas per instrumaterialoj, instruhelpiloj al tiuj gekolegoj, lernejoj, kiuj tion bezonas kaj petas.

Lerneja projekto 2008-2010

Gajnita Comenius-projekto por 3 bazlernejoj (jaraĝo 8-12): Springboard lernejo en Bar Hill/Cambridge, Britio, Herzberg am Harz, Germanio kaj Miskolc, Hungario. La celo estas interkultura edukado, lernado per muziko, instruado de Esperanto kiel lernfaciliga studobjekto. Okazas reciproka vizito kun gepatroj.

Junulara laboro

Kunlaboro kun Germana Esperanto-Junularo (GEJ), ekz. helpo ĉe lerneja instruado (Günne), prizorgado de infanoj dum somera renkontiĝo en Pollando, partopreno de gejunuloj en pedagogiaj tagoj, klerigkursoj.

Klerigado, pluklerigado

en kunlaboro kun Germana Esperanto-Asocio (GEA): kunordigante farendaĵojn kun Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg okazas klerigesioj, seminarioj dum la tuta jaro. Celo: trejni novajn E-instruantojn, zorgi pri ilia kvalifikado, lingva-faka spertiĝo, doni pluklerigeblon al gekolegoj, oferti seminariojn, fakprelegojn. En 2008 la ĉeftemoj estis interlingvistiko (Detlev Blanke), literaturo, informado, varbado, gramatiko, metodiko.

Renkontiĝoj

La plej gravaj kunvenoj estis la

- jarĉefkunveno de AGEI dum la tradicia, ĉiu-jara Germana Esperanto-Kongreso (GEK, majo 2008 en Essen)
- TORPEDO-4 (Tutlanda Oktobra Renkonto Pedagogia) 02-05.10.2008 en Herzberg am Harz. Faka renkontiĝo, spertinterŝanĝo.

Ĉeftemoj:

- Cseh-metodo kaj aliaj metodoj por efika E-instruado. Invititoj: Sabine Trenner, Zlatko Tisljar, Stefan MacGill.
- Esperanto-instrumaterialoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (Rudolf Fischer)
- Esperanto en la lernejo kaj lernejoj projektoj (Zsofia Korody)
- partopreno en la laborkunveno de delegitoj de Federaci-landaj Esperanto-Ligoj (novembro 2008): kunordigo de agado, jarplanado, komunaj aktivecoj
- partopreno en Tago de Lernejo dum UK, (maleblis partopreno dum la ILEI-konferenco en Benino)

Ekzamenoj

kunlaboro kun Germana Esperanto-Instituto kaj UEA. En decembro 2008 okazis trejnado de ekzamenontoj por la novaj UEA-ITK (Origo) ekzamenoj (niveletoj B1, B2 kaj C1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro) en Herzberg am Harz.

Informado

AGEI membroj ricevas la revuon IPR, en ĉiu numero aperis alvokoj aŭ raportoj pri instru-agado en Germanio. Ili ricevas ankaŭ neregulajn cirkulerojn kun alvokoj, novaĵoj, gravaj sciindaĵoj pri en- kaj eksterlandaj instru-rilataj eventoj, ktp. Informkanalo estas ankaŭ *Esperanto aktuell*, ĉefa organo de GEA. AGEI ekhavis novan hejmapaĝon ligitan al la hejmapaĝo de GEA: <http://esperanto.de/agei>



Membroj fine de 2008: 85 – 78 paperaj, 6 retaj.

Komitata rajtigo: 4

Nomumita: 4. (Christof KRICK, Rudolf FISHER, Harald SCHMITZ, Wolfgang BOHR)

Hejmapaĝo:

<http://esperanto.de/agei>

Hungario

La 8-an de marto 2008 Asocio de Hungaraj E-Instruistoj (Esperantisták Pedagógusok Magyarországi Egyesülete, EPME) havis asembleon, jen resumo de la protokolo [interkrampe la postaj notoj]:

A: Asemblea raporto

Loko: Idegennyelvi Továbbképző Központ, (Fremdlingva Plueduka Centro), Budapest, Rigó u. 16.

Ĉeestis: 30 membroj de nia asocio [ĉ. 55 %-oj de la membroj ĉeestis, t.e. ni havis kvorumon]

Prezidinto de la asembleo: Tötösné Gados Zsuzsanna

Protokolinto: Sereghyné Zengő Enikő

Aŭtentikigintoj de la protokolo: Kovács Márta, Salomonné Csiszár Pálma

Laŭ la decido de la asembleo, ni havis en la tagordo tri temojn:

1) La prezidanto de EPME raportis pri la jaro 2007

Membraro: en la jaro 2007 ni atingis rekordon membronombron: fine de la jaro ni havis 55 membrojn. 14 gekolegoj membriĝis sen IPR, ili estis membroj de EPME sen membreco en ILEI. El la 41 membroj de ILEI-HU 6 kolegoj ricevis IPR-on rete.

Financoj:

- Fine de 2006: ni havis ĉ. 587mil HUF (el tio ĉ. 150mil HUF subvencia monrestaĵo NCA 2006/2007)
- Fine de 2007 ni havis ĉ. 577mil HUF* (el tio ĉ. 65mil HUF subvencia monrestaĵo de NCA 2007/2008)
- *enkase: 150mil, enbanke 427mil (el la banka sumo en kuranta konto 106 mil)
- Enspezoj dum 2007 sume: ĉ. 248mil HUF
- Elspezoj dum 2007 sume: ĉ. 258mil HUF

NCA-subvencioj:

En la jaro 2006 ni gajnis 400 mil kaj en 2007 200mil HUF por subteni la funkciadon de nia asocio. Ĉar nia asocio ne estas publikutila, ni ne rajtis peti monon por organizado de programoj. Pri utiligo de la unua sumo ni jam sukcese raportis al NCA. Por pretigi la konkursaĵojn kaj kompili la raportojn pri la utiligo de la NCA-subvencioj ni ricevis helpon de MESZ. El la ricevita mono ni aĉetis komputilon (Pentium IV-tipan kun 19-cola LG LCD-ekrano) kaj ekde tiu tempo la revuo IPR la hejmpaĝoj de ILEI, ILEI-HU kaj IPR redaktiĝas en la sidejo de EPME. Krome ni aĉetis ciferecan fotilon kun aparta fulmolampo por dokumenti niajn kunvenojn. Vidu la fotojn en IPR 07/3 [kaj la 5 fotojn en IPR 08/2]!

Por faciligi la kontaktojn ni aliĝis al la telefona grupo E-mobil, tiel la sekciestro nun povas senpage interparoli kun pli ol 10 EPME-anoj. La monata abono estas 1440 HUF, kaj ni neniam transpaŝis la tempan limigon. Ĝiajn kostojn komence ni pagis el la subvenciaj monoj.

[krome ni pagis el la subvencia mono preskaŭ ĉiujn afrankokostojn, bankkoston kaj administrajn kostojn de la du subvenciaj periodoj!]

META 2007:

Konkursante por NCA-subvencio ni petis monon por eldoni informilon, kiu helpas la kontaktojn kaj informadon ene de la asocio. Tiel venis la ideo, ke ni eldonu kajeron pri niaj membroj por niaj membroj kun la titolo „Portretaro de Hungaraj Esperanto-Instruantoj”. En la eldonaĵo estas trovebla la aktuala, 55-persona membrolisto de la asocio (inter ili la 41 membroj de ILEI-HU) kaj 45 aliaj E-instruantoj, do, sume la nomo kaj loĝloko de 100 E-instruantoj. La enketilon de EPME/ILEI-HU resendis entute 80 gekolegoj (inter ili 35 EPME-anoj kaj 2 ILEI-anoj. En la eldonaĵo ni aperigis la tiel kolektitan respondaron, kune kun la ricevitaĵoj (sur la kolora kovrilpaĝo videblas la portretoj de 64 gekolegoj). La resendintoj de la enketilo reprezentas ĉiujn 19 departementojn de Hungario, krome ni havas 23 resendintojn el Budapeŝto.

En la datumbazo oni povas trovi ekz. la sekvajn indikojn: naskiĝdato, loĝadreso, telefono, retadreso, hejmpaĝo, profesio(j), parolataj lingvoj, E-lingvoekzamenoj, membreco en E-organizaĵoj, E-movada agado, E-instrua agado, proponoj por evoluigi la E-instruadon. Por gardi la relativan pacon inter la EPME-anoj, 1-2 tiklajn frazojn de kelkaj resenditaj enketiloj, oni ellasis.

La libreto ne estas aĉetebla en librovendejoj, sed ĝin aŭtomate ricevis/os ĉiuj nunaj kaj estontaj membroj de EPME/ILEI-HU (plus tiuj 45 gekolegoj, kiuj resendis la enketilon).

Cetera agado de la sekcio dum 2007:

Li kompilis la hungaran dissendo-liston por la sekretario de ILEI, peris nian jarkotizon al ILEI, dissendis cirkulerojn al la membroj. Krome li daŭre faris la librotendon de nia asocio, sendis impostan deklaron al APEH (la ŝtata imposto-instanco), kaj statistikan enketilon al KSH. En 2007 li daŭre redaktis IPR-n kaj prizorgis la hejmpaĝojn de ILEI kaj IPR. Li iom plukonstruis la hejmpaĝon de la hungara ILEI-sekcio, kaj tie ni jam havas riĉan materialon (vizitu: <http://www.ilei.info/hungario/index.php>).

La raporton de la prezidanto la asembleo (kun 28 jesa kaj du sindetenaj voĉoj) akceptis.

2. Modifo de la statuto de EPME en 2008

La prezidanto iniciatis kelkajn modifojn, parte por plibonigi la funkciadon (ekzemple havi kvorumon en niaj asembleoj), parte por alĝustigi la statuton al la koncernaj leĝoj. Post longa diskutado kaj pluraj alparoloj, ni decidis modifi la statuton jene:

- ekde nun ekzistas la kategorioj de „apoganta membro” kaj „plenrajta membro”. Por esti apoganta membro oni pagas la membrotendon de EPME. Por esti plenrajta membro oni devas membriĝi ankaŭ en internacia ILEI (kun reta aŭ papera IPR).
- la apogantaj membroj ne havas voĉdonrajton
- la asembleo havas kvorumon, se ĉeestas pli ol la duono de la membraro [anstataŭ la ĝisnunaj 40 %-oj]
- ni forigis el la statuto la eblecon de la perpoŝta voĉdonado.

La asembleo unuanime akceptis la modifojn de nia statuto.

3. Elekto de la nova estraro en 2008

[Laŭ nia statuto la asocio ĉiun trian jaron elektas novan, maksimume kvinpersonan estraron. Dum la pasintaj asembleoj ni plurfoje klopodis plenumi tiun taskon, sed manke de kandidatoj ĝis nun ĉiam sensukcese. Feliĉe, dum nia lasta asembleo tio ŝanĝiĝis.]

La estro de la kandidatiga komitato laŭtlegis la nomojn de la kandidatoj (en la vicordo de la kandidatigo): Németh József, Salomonné Csiszár Pálma, Kovács Márta, Baksa József, Eszényi József, Kovács Attiláné. Surloke kandidatiĝis ankaŭ: Szilvási László, Bartek Anna, Sereghyné Zengő Enikő kaj Perczel-Szabó Katalin.

El la 30 ĉeestintoj voĉdonis (skribe) 28 gekolegoj.

Post la kalkulo de la voĉoj Tötösné Gados Zsuzsa raportis pri la rezulto. Por la sekva, tri-jara periodo la asocion estros la sekvaj kvin personoj: Németh József (27), Kovács Márta (23), Salomonné Csiszár Pálma (20), Sereghyné Zengő Enikő (16), Baksa József (12)

Fine de la tagordo Tötösné Gados Zsuzsa kaj Németh József dankis la laboron de la asembleo.

B) Pedagogia Tago kaj laborkunvenoj de ILEI-estraro en Budapeŝto

La 24-a Pedagogia Tago okazis en ITK (Fremdlingva Pliperfektiga Centro), kie eblas ekzameniĝi nun pri 22 diversaj lingvoj, interalie pri E-o en tri niveloj (B1, B2, C1).

Vendredon antaŭ la Pedagogia Tago la estraro de ILEI havis preparoladon kun la direktorino de ITK GÁBORJÁN Lászlóné kaj la vicdirektoro SZABÓ László pri la antaŭpreparata unulingva Esperanta ekzameno, kiun ILEI-UEA kaj ITK komune ellaboras.

Sabaton kvindeko da E-instruantoj havis pliperfektigan trejnadon en tiu ĉi instituto.

Komence Pálma CSISZÁR-SALOMON informis pri la statistikoj rilataj al la E-lingvaj ekzamenoj en ITK. Ekde 2002 ĉiujare pli-malpli 6000 ekzamenoj okazas en la instituto pri Esperanto. La sumon oni nepre duonigu, ĉar la buŝa kaj la skriba ekzameno kalkuliĝas aparte.

Estas personoj, kiuj jare plurfoje provas ekzameniĝi, se la unuan fojon ili malsukcesis, do oni povas diri, ke pli-malpli 2500 pesonoj ekzameniĝas pri E-o jare en la Fremdlingva Perfektiga Centro. La pliparto de la kandidatoj rolas kontentige en la buŝa ekzameno, sed la sukcesoprocento en la skriba parto meznivele estas nur ĉ. 40%-oj. La statistikoj montras, ke la lernantoj havas problemojn pri la traduko el la hungara al E-o, pri la testo, kaj surprize ankaŭ pri la tekstokompreno. Specimeno pri la ekzameno troveblas en la hejmpaĝo de <edukado.net>, kaj nun jam ankaŭ sur la hejmpaĝo de ITK ([http://www.itk.hu/vanyagok /eszperanto/index.htm](http://www.itk.hu/vanyagok/eszperanto/index.htm)).

Post la prezento de la statistikoj la ĉeestantoj komune korektis solvojn de la februara ekzamena traduktasko, kaj de la tekstokompreno helpe de Zsuzsa TÖTÖSNÉ GADOS. La kunlaborantoj de ITK klopodis klarigi la postulojn kaj la uzatan korektmanieron. Post la asembleo de ILEI-HU, la partoprenantoj pridiskutis en grupoj kiel eblus prepari la lernantojn pli efike al la taskoj, kiuj estas laŭ la statistikoj malfacilaj por ili.

Dum la posttagmezo Ludoviko MOLNÁR prezentis la projekton „Lingvolanĉilo“, kies celo estas almenaŭ eksperimente enkonduki E-on en plejeble multajn bazlernejojn por

plifaciligi la lernadon de aliaj fremdlingvoj. Momente en Hungario en kvin bazlernejoj oni instruas E-on, kaj oficiale nur en unu mezlernejo, kvankam ankaŭ abiturientiĝi eblas pri E-o en Hungario. Post tio Veronika HÉE prezentis interesan prelegon pri la planita nova eldono de la hungara-esperanta vortaro, redaktita de Alfonz PECHAN. Fine de nia programo alvenis la estraro de ILEI, kiu havis liberan interparoladon kun la ĉeestantoj. Zsófia KÓRÓDY, vicprezidantino prezentis la nove eldonitan E-lingvan tradukon de Komuna Eŭropa Referenckadro, kiu estas tre utila en la laboro de la ekzamenantoj kaj instruantoj de E-o.

Ŝi informis la publikon ankaŭ pri la ellaborata unulingva E-ekzameno. Tamen la celpubliko de la ILEI-ITK-ekzameno ne estas ĉefe la hungaroj, sed ĉiuj eksterlandaj E-lernantoj. Ĝuste pro tio mankos el tiu ekzameno la tradukekzerco, kio estas la plej granda diferenco kompare kun la nuna dulingva ekzameno de ITK. (Pliaj informoj pri Pedagogiaj Tagoj en la hejmpaĝo de ILEI: www.ilei.info).

Pálma CSISZÁR-SALOMON, estrarano de ILEI-HU

C) Kio okazis post la asembleo?

- 1) La originalan, plenan protokolon, kun la subskriboj de Tötösné Gados Zsuzsanna (prezidinto de la asembleo), Sereghyné Zengő Enikő (protokolinto), Németh József (prezidanto de EPME), Kovács Márta kaj Salomonné Csiszár Pálma (aŭtentikigintoj) mi sendis al la Ĉefurba tribunalo (Markó u.). Kune kun la protokolo mi sendis al ili la modifitan statuton kaj la liston de la partoprenantoj de nia asembleo. La 5-an de majo 2008 la tribunalo informis nin, ke la modifoj estas laŭleĝaj kaj la ensenditaj dokumentoj estas en ordo, tial la tribunalo akceptas ilin. Ĉar neniu apelaciis, la 30-an de majo 2008 la juĝista decido ekvalidiĝis. Pri tio ni ricevis duan leteron de la juĝejo meze de junio 2008.
- 2) La 30-an de junio 2008 ni sendis detalan raporton al ESZA Kht. pri la uzo de la subvencia mono de NCA en la periodo 2007-2008 (1 junio 2007 - majo 31 2008). Krome, ni denove kompilis kaj ensendis subvenci-peton (por la periodo 2008/2009), sed ĉi-foje ne al la landa centro, sed al la Mez-Transdanubia Regiona Kolegio. Bedaŭrinde ĉi-foje ni ne gajnis monon.
- 3) En majo mi plenigis kaj resendis al la regiona centro de KSH (Centra Statistika Oficejo) en Győr la ĉi-jaran statistikan enketilon.
- 4) Dum pluraj jaroj mi helpis la administradon de la internacia membraro de ILEI. Sed ekde 2008 mi ne rajtis havi rektajn informojn pri la dissendolisto de IPR ĉe FEL. Ĉiuj reklamacioj devis iri al la Sekretario. Sed mi petas la membrojn, ke ili nepre informu ankaŭ min, se ili volas, ke mi helpu!
- 5) Fine de 2008 ni havis 57 membrojn, el inter ili 48 kolegoj estas membroj de ILEI, laŭ nia nova statuto, ili estas „plenrajtaj membroj”. Ni havas plurajn novajn membrojn, precipe en la kategorio de retaj abonantoj, sed estas naŭ malnovaj membroj, kiuj ĉi-jare ne remembrigis.

Jen la listo de la 32 paperaj abonantoj en 2008 (plenrajtaj membroj de EPME kaj ILEI):

Baksa József, Bognár Ágnes, Bujdosó Iván, Eszényi József, Faragó Katalin, Gaál Győző, Gados László, Gaál János, Gál Norbert, Harnyos Ferenc, Hevesi-Molnár Anikó, Kirsch János, Kovács Attiláné, Kovács Márta, Kovács Katalin, Könczöl Ernő, Kurucz

Géza (Honora Membro), Stefan MacGill, Molnár Lajos, Molnár-Farkas Julianna, Molnár Mária, Nemesné Lakatos Ildikó, Németh József, Óri Sándorné, Petik János, Salomonné Csiszár Pálma, Sereghyné Zengő Enikő, Slezákné Tar Edit, Sztankó István, Tihanyi Péter, Tötösné Gados Zsuzsa, Wacha Balázs.

Jen la listo de la 16 retaj abonantoj en 2008 (plenrajtaj membroj de EPME kaj ILEI):

Bartek Anna, Berényi Csilla, Besenyei Anna, Fedor Ilona, Felszeghy Judit, Ferenczy Imre, Flender György, G. Nagy Róbert, Máthé Árpád, Molnár Mónika, Rátkai Árpád, Szabadi Tibor, Szabó Mária, Vágóné Bárány Zsuzsa, Varró Attila, Vizi László.

Jen la listo de la 9 apogantaj membroj de EPME (sen membreco en ILEI): Bágyi András, Belkovné Gulyás Róza, Gyarmathy Zsolt, Jáger Éva, Kovács Zoltánné, Nagy Kornélia, Sudár Sarolta, Szabó Imre, Szilvási László.

6) Postnotoj: 9 membroj de la jaro 2007 ne pagis en 2008 sed eĉ sen ili ni havas pli da membroj ol en la jaro 2007. Laŭ mia persona opinio, la kreskon de la membronombro helpis la eldono de META 2007 (eĉ se por aperi en ĝi oni ne devis membriĝi).

Estos malfacila tasko atingi, ke dum la jaro 2009 la membronombro ne malkresku.

Ihász, 2009-03-21, Jozefo Németh, sekciestro de ILEI-HU.

<jozefo.nemeth@gmail.com>



Membroj fine de 2008: 49 – 32 paperaj, 17 retaj.

Komitata rajtigo: 3

Nomumitaj: 3 (Jozsef NEMETH, Katarina FARAGO, Stefan MacGILL). La lasta nun ankaŭ laŭofica komitatano.

Retejo: <http://www.ilei.info/hungario/index.php>

Italio

La Estraro dum 2008:

Oberrauch Madella Luigia, sekciestro; Di Donato Alessandra, komitatano; Colacicchi Anna Maria, komitatano; Dalla Torre Mauro, komitatano; Tarracchini Ermanno, komitatano

ILEI-IT dum 2008 havis 63 membrojn. 65 el ili estis abonantoj de la revueto "Juna Amiko".

La jarkunsido okazis la 2-an de septembro 2008 en Grosseto kadre de la 74-a Itala Esperanto-kongreso. La kontaktoj inter la estraranoj estis ĉefe interretaj por eviti aliajn elspezojn por la vojaĝoj.

En Grosseto okazis kurso de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj gviditaj de s-ino Anna Loewenstein kaj de mi. Kelkaj studemuloj profitis de ili.

La kunlaboro kun I.F.E. (Itala Esperanto Federacio) kaj kun I.I.E. (Itala Instituto de Esperanto) kiu devus kontroli la instruadon kaj la regulan disvolviĝon de la tri diversgradaj ekzamenoj de la lingvo, lastatempe pliboniĝis. Oni faris alian plian paŝon direkten al la akcepto de la Komuna Eŭropa Refrenckadro.

La Itala sekcio de ILEI estis unu el la organizoj, kiuj forte kunlaboris en la realigo de la projekto Sokrates - Comenius AKEL 2 (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj) kaj la komitatano Tarracchini kaj la estrino Oberrauch mem persone partoprenis en la sesa internacia renkontiĝo en Polski Trambesh, Bulgario (aprile 2008). Pri la AKEL-renkontiĝoj oni legu en <www.edukado.net> (ĉe Lingvolernigaj projektoj). Krom la raportoj pri la agadoj plenumitaj dum la trijara ekzisto de AKEL 2 senditaj al la nacia Agentejo de Florenco, la kvar partoprenintaj naciaj delegacioj (brita, bulgara, hispana kaj itala) verkis 6-lingvan konversacian polibreton en la angla, bulgara, esperanta, hispana, itala lingvoj kaj en la lingvo de la signoj.

Ekde Septembro 2008 oni realigas novan EU-projekton kiu nomiĝas „Interkultura kaj multlingva dialogo per neŭtrala pontolingvo Esperanto inter Italujo, Hispanujo kaj Portugalujo“. La unua internacia renkontiĝo inter la tri naciaj delegacioj okazos en Modeno kaj Pescara dum aprilo 2009.

Italaj ILEI-anoj kunlaboris en la preparado de projekto adresita al studentoj de la lastaj klasoj de elementaj lernejoj kaj al ĉiuj klasoj de mezlernejoj kiu prenis la nomon "L'itagliano e i giovanissimi." ("la itala-angla kaj la plej junaj homoj") kiu celas vidi per enketilo kiomgrade la angla jam anstataŭis la italan gepatran lingvon en la ĉiutaga komunikado inter la gejunuloj. Tiun chi projekton subtenas nun la itala gazetara agentejo „Alarmo lingva“ kaj s-ano Nicola Minnaja prezentis ĝin al UNESKO por festi la Internacian Jaron de la Lingvoj 2008. La projekto estas enlistigita inter la projektoj de UNESKO kaj vi povas ĝin trovi ankaŭ en la reto, je la paĝo

http://portal.unesco.org/culture/en/ev.php-URL_ID=37250&URL_DO=DO_TOPIC&URL_SECTION=201.html.

Instruado:

Esperanto-kursoj okazis en la sekvaj ŝtataj lernejoj:

- en Parma (provinco Parma) ĉe la Elementa lernejo "Laura Sanvitale", kun 15 lernantoj dum 8 hora instruado,

- en Casalenda (provinco Campobasso) ĉe la Istituto Superiore "D.De Gennaro" kun 32 gekursanoj,
- en Modena ĉe la mezlernejo "C.Cavour" kun 20 gelernantoj,
- en Pescara ĉe mezlernejo "Tinozzi" kun 21 gelernantoj,

Kursoj okazis en Universitatoj de la Tria Aĝo:

- de Fidenza (provinco Parma) kun 8 gelernantoj,
- de Milano kun 20 lernantoj,
- de Ancona, Arenzano Cogoletto,
- en la Tria Roma Universitato de Romo profesoro Mauro Dalla Torre aranĝis por doktora kursaro 8-horan seminarion pri Interlingviko sub la titolo "Artefareco kaj naturo en la lingvo",
- en la Universitato de Torino (Interlingvistiko kaj esperantologio)
- kaj en aliaj urboj ĉe la katedroj de Esperanto (Bologna, Firenze, Milano, Parma, Pescara, Pisa, Recanati Udine, Rimini, Roma, San Pietro Infine /Caserta/, Senigallia, Trento, Trieste, Vercelli kaj Vicenza).

En Italio estas sufiĉe populara reta kurso (KIREK) kaj multaj el ties tutoroj estas membroj de ILEI. Oni nun estas pripensanta kiamaniere KIREK kaj ankaŭ aliaj kursoj en interreto povus pli bone kaj efike atingi la homojn kaj helpi al ili lerni rapide kaj bone la lingvon konvinkante ilin iĝi membro de la esperanta komunumo.

Plurmonatan lingvan laboratorion povis realigi prof-ino Anna Maria Colacicchi en Pescara kie en la unua klaso G de la ŝtata mezlernejo „Domenico Tinozzi” oni preparis poste, por la turisma oficejo de la urbo, bildojn *PowerPoint*, kun tekstoj verkitaj en esperanto.

Vidu: <http://www.internacia-gazeto.com/lernejo-tinozzi/tabelo.htm>

Instruisto Leonardo Pampaloni (el Prato) prezentis Esperanton dum la seminario de ANILS (Asocio de la Italaj Instruistoj de Fremdaj Lingvoj) okazinta en Florenco majo 2008.

Same ILEI-ano Pampaloni faris fulmokuson pri esperanto en Massa post la tiea inaŭguro de la Itala Biblioteko de Esperanto kiu nun troviĝas en la Ŝtata Arkivo de Massa. Dum tiu ĉi inaŭguro d-ro Alessandro Simonini rememorigis nin pri la elstaraj anoj de ILEI – la gefratoj, Mario kaj Katina Dazzini, kiuj estis la fondintoj de tiu ĉi biblioteko nun alirebla ankaŭ pere de la ttt-paĝo:

eo.pandapedia.com/wiki/Nacia_Biblioteko_de_Esperanto

Nome de la estraro de ILEI-IT, Luigia Oberrauch Madella

<silkvojo@aliceposta.it>



Membroj fine de 2008:64 – 58 paperaj, 6 retaj.

Komitata rajtigo: 4

Nomumita: 4 (Ana Maria COLACICCHI, Ermanno TARRACCHINI, Luigia OBERRAUCH, Mauro La TORRE)

Retejo: <http://www.ilei.info/hungario/index.php>. En Esperanto.

Japanio


Membraro

Nove aliĝis s-ino Tazima Mayuko, muzikinstruistino en supermezlernejo, kaj entute estis 16 membroj en nia sekcio. Ĉi tie "membro" signifas tiu, kiu pagis membrotizon de ILEI sed ne tiu, kiu pretas kune labori aŭ agadi por esperanto-edukado en Japanio sub la nomo de ILEI. Du grandaj organizaĵoj, Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG) mem havas edukon fakon kaj faradas diversajn aktivadojn laŭ siaj agadoplanoj. Ĉiu el nia sekcio apartenas al unu aŭ ambaŭ de la organizaĵoj kaj kelkaj multe laboris organizante seminariojn, ekzamenojn, porinstruistan seminarion, ktp. En la nuna situacio estus malfacile havigi al niaj sekcianoj unu grupcon kaj inklinon labori por certaj celoj aŭ planoj.

Agadoj:

Japanaj ILEI-anoj agadis individue. Hori Yasuo, Tazima Mayuko kaj Isikawa Tiekio kune kun aliaj du ne-ILEI-anoj partoprenis la 41-an Konferencon en Benino. Ĉiuj kontribuis siamaniere por la sukceso de la konferenco, kaj bone estas, ke eĉ post la konferenco daŭras kontakto kun afrikaj samideanoj. Tazima Mayuko gvidis koruson de lokaj lernejoj en la 95-a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Wakayama. Ili kantis ankaŭ esperante. Syozi Keiko kaj Isikawa Tiekio laboris en projektoteamo kiu celas fari novan lernomaterialon por elementaj klasanoj. La materialo ankoraŭ ne kompletigas kaj la laboro daŭros en 2009.

Raportis ISIKAWA Tiekio
31/03/2009



Membroj fine de 2008: 14 – ĉiuj paperaj.
Komitata rajtigo: 1
Nomumita: 2 (ISIKAWA Tiekio, SUZUKI Masumi)

Retejo:

Korea Respubliko

La Korea sekcio de ILEI elektis novan gvidantaron en la jaro 2009.

sekciestro : LEE Jung-kee

vicsekciestro : KIM Jin-ho

sekretario : KONG Kil-yoon

La korea sekcio planas havi renkontiĝon kun instruistoj en tiu ĉi jaro por starigi planon por la jaro 2010.

Tio signifas, ke de la sekvonta jaro la korea sekcio pli aktive moviĝos por vigligi la movadon de la sekcio.

Krome, korea sekcio engaĝiĝos en la faka kunsido de ILEI-sekcioj en Azio, kiu okazos kadre de la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbatoro, Mongolujo (2010.6.19~23).

LEE Jung-kee (korea sekciestro de ILEI), 04/06/2009



Membroj fine de 2008: 0

Komitata rajtigo: 0

Nomumita: 0

Retejo:

Kroatio

KEU

MEMBRARO

Nombro de niaj membroj, kiuj membras en ILEI (kategorio «reta aliro») ne ŝanĝiĝis kaj daŭre estas ses.

SEMINARIOJ, KUNVENOJ

Kiel kutime, ni aranĝis du seminariojn por niaj kursgvidantoj kaj kunlaborantoj. La printempa seminario estis ligita al pristudado de nova materialo, kaj diskuto pri ĝia adaptiĝo por niaj bezonoj. Oni trovis necese por iuj materialoj pretigi kroatlingvajn klarigojn por ke ilia uzo estu pli facila ĉefe por komencantoj.

La aŭtunan seminarion ankaŭ partoprenis kelkaj lernantoj. Tiu sperto montriĝis ege valora, ĉar oni povis iom pli konkrete aŭdi kaj ekpensi solvojn por iuj problemoj, kiujn oni renkontas dum la E-instruado.

Aparte oni notis deziron de la kursanoj, ke dum la instruado oni pli uzu la modernajn ilojn (komputilojn). Rilate tion oni provos ene de KEU esplori diversajn eblecojn.

Pri la rezultoj kaj plibonigo de la agado de HES-KEU rilate la instrukampon oni ankaŭ plurfoje diskutis dum la estrarkunsidoj kaj okaze de la ĝenerala kunsido.

Apartan atentigon oni donis al la eroj, kiuj rilatas ankaŭ al aliaj agadkampoj de HES-KEU: internacia kunlaboro, informado, junularo, kulturo.

INTERNACIA KUNLABORO

Nia membrino Marija Belosevic dum la Tago de la Lernejo en UK prezentis diversajn projektojn kiujn ni realigas por kursanoj kaj ĝenerale por junularo en la senco doni ideon por la libera tempo.

La UK kiel kutime estis bona okazo interŝanĝi spertojn kaj ankaŭ neformale diskuti pri diversaj kunlaboreblecoj.

Bedaŭrinde, pasintjare ni ne havis reprezentanto(j)n dum la Konferenco. Kialo: manko de la financaj kondiĉoj por veturi al la afrika kontinento.

prof. Ivan Bekavac Basić

LS de ILEI/KEU

Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio

+385 1 37 45 052

ilei@hes-keu.hr

04/05/2009



Membroj fine de 2008: 5 – ĉiuj paperaj

Komitata rajtigo: 1

Nomumita: Marija BELOSEVIC

Retejo:

ilei@hes-keu.hr

Nederlando

La membraro komence de la jaro nombris 29 personojn.

Eksiĝis S-ino N. GROOTEN, S-ino S. KROMBEEN, S-ino S. MENSEN kaj S-ino G. UITTENBOGAARD. Aliĝis S-ro W. BARIS, S-ro J. DERKS kaj S-ino M. vd KOOIJ.

La membraro fine de la jaro 2008 nombris 28 personojn.

La Estraro, konsistanta el Rob MOERBEEK (prezidanto), Julija BATRAKOVA (kasisto), Simon SMITS (protokolanto) kaj Atilio ORELLANA ROJAS (Sekretario), kunvenis 5 fojojn en la sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto (januare, aprile, junio, septembre kaj decembre).

La Jarkunveno okazis la 1-an de marto 2008 en la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto en Den Haag. S-ino Julija BATRAKOVA estis reelectita kiel Kasisto kadre de la Jarkunsido.

La Studotago okazis la 4-an de oktobro 2008 ĉe la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto kaj ĝia ĉefpreleganto estis Stano MARCEK el Slovakio, kiu prezentis la verkon 'Esperanto per rekta metodo'. Alia preleganto tiutaga estis S-ino Kasja MARCINIAK, pri Pollando, lando de la UK 2009. La Studotago okazis dank'al la subvencio de Fonduso Mabesoone de *Esperanto Nederland*.

La sekcia bulteno "NGGE Sciigas" aperis 3-foje: en februaro, junio kaj oktobro.

la 26-a de januaro 2009

<ieiesperanto@versatel.nl>



Membroj fine de 2008: 31 – 24 paperaj, 6 retaj.

Komitata rajtigo: 2

Nomumitaj: 2 (Simon SMITS - Atilio ORELLANA ROJAS)

Retejo:

Rumanio

Dum la jaro 2008 okazis la jenaj e-kursoj:

- en Tautii Magheraus: kun komencantoj, 12-15 jaraĝaj kursanoj (instruisto Emil Crancau);
- en Vatra Dornei: kun komencintoj, 12-17 jaraĝaj kursanoj (instruisto Nicolae Macovei);
- en Suceava: kun komencintoj, 13-17 jaraĝaj kursanoj (instruisto Ionel Bodale);
- en Bixad: kun komencintoj; 12-14 jaraĝaj lerneĵanoj (instruisto Mihai Trifoi).

Krom tiuj kursoj la ILEI-anoj de nia sekcio agadis dum la tuta jaro por informi la publikon pri la E-movado kaj pri niaj celoj. Ĉiu ILEI-ano pasie laboras en tiu E-centro, kie li vivas. De individua studado kaj korespondado al klubaj renkontiĝoj aŭ partopreno en diversaj E-aranĝoj ili neniam perdas la okazon diskonigi la informojn pri la E-movado enlande kaj eksterlande, per artikoloj en ĵurnaloj kaj revuoj, per intervjuoj aŭ per aliaj diversaj rimedoj. Kelkaj daŭre perfektigas profesie sed uzante ankaŭ la E-agadon. La revuoj «ES-TO» kaj «BAZARO» daŭre aperis en Rumanio, pere de la subteno de la enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

En la jaro 2008, nia kolego D-ro Marian Constantinescu finis la instrulibron «Manual de limba ESPERANTO», kiu estis eldonita en 2009 (Eldonejo GRAPHICA). La libro enhavas sufiĉe ampleksan gramatikon, 26 lecionojn, vortareton kaj aliajn utilajn informojn por la dezirantoj lerni esperanton; ĝi estas verkita por ruman-parolantoj.

Aurora Bute agadas kiel UEA- kaj ILEI-komitatano, estante ankaŭ la prezidanto de EAR, kaj Mihai Trifoi agadas kiel sekciestro de la Rumana ILEI-Sekcio, sed ankaŭ en la estraro de ILEI, organizante en ĉiu jaro la Tagon de la Lernejo kadre de la UK kaj plenumante aliajn taskojn.

Domaĝe la cirkonstancoj ne ĉiam estis favoraj kaj kelkaj el niaj projektoj falis pro manko de rimedoj.

Bixad, 12.06.2009, Mihai Trifoi, ILEI-sekciestro

<trifoi@honoris.ro>



Membroj fine de 2008: 18 – 1 papera, 17 retaj.

Komitata rajtigo: 2

Nomumitaj: 2 (Aurora BUTE, Mihai TRIFOI)

Retejo:

Svislando

Okazas studsabatoj en La Chaux-de-Fonds en la urba biblioteko en la centro CDELI organizitaj de S-ro Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Monika Molnar, kiuj instruas ĉiam tra la tuta jaro la trian sabaton de la monato. Partoprenas inter 10 kaj 30 personoj. Estas lingvokursoj laŭ tri niveloj. Diversaj instruistoj kunlaboras en tiu instrua tasko. Plie estas seminarioj kun iu temo, tiuj kunvenoj okazas la unuan sabaton de ĉiu monato. Prelegis Claude Gacond. Partoprenis inter 5 kaj 10 personoj. Tiuj renkontiĝoj okazas sub la aŭspicio de la Svisa Esperanto Societo SES kaj de la Svisa ILEI sekcio SIS.

Mireille Grosjean, ILEI-Sekciestro, 20/04/2009

<mirejo.mireille@gmail.com>



Membroj fine de 2008: 17 – 15 paperaj, 2 retaj.

Komitata rajtigo: 2

Nomumitaj: 2 (Jean-Thierry von BÜREN, Mireille GROSJEAN)

Retejo:

Usono kaj Kanado

De junio 2007 ĝis julio 2008

Dum la pasinta jaro okazis Esperanto-klasoj en la jenaj lernejoj:

1. Ĉe gimnazio ("Christian Brothers High School) en St. Louis MO (instruis Ron Glossop)
2. Esperanto-klubo en gimnazio en Ottawa (Kanado). Unu kursano partoprenas NASK-on ĉi-somere (vidu sube) Instruas Kim Keeble
3. NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) ĉe la Universitato de Kalifornio en San Diego (pasint-somere ĉeestis 20 lernantoj; ĉi-somere NASK okazas 30 junio-18 julio).
4. Smith College student-centro en Northampton MA (Sally Lawton)
5. Ĉe "Harrisonburg Middle School" al 12-13-jaruloj kiel parto de kurso pri "Esplorado de Fremdaj Lingvoj" en Harrisonburg VA; entute 80 lernintoj en 9-semajnaj kursoj kadre de klaso pri "Tutmonda Civitaneco" (Jeremy Aldrich)
6. Ĉe "Principia College" en Elsah, Illinois; 9-semajna kurso kun kredito (Duncan Charters)
7. Ĉe "Massachusetts College of Liberal Arts" en North Adams, MA (Allan Boschen)
8. Ĉe "Stanford" Universitato en Kalifornio - Konversacia kurso dum 16 jaroj (Ed Williger)
9. Ĉe "North Carolina School of Science & Mathematics" en Durham NC (baza kaj progresiga kursoj); ĉiu klasano ekzameniĝis per la Usonaj Baza kaj Duagrada Ekzamenoj ĉe la fino de ĉiu kurso. (Don Houpe)

La jenaj Esperanto-klasoj estas inter tiuj kiuj okazis ekster lernejoj:


1. En Novjork-Urbo je komenca kaj progresiga niveloj (Thomas Eccardt)
2. Al plenkreskuloj en Northampton MA (Sally Lawton)
3. Ĉe Unitariana pregxejo en San Francisko, Kalifornio

Okazas la jenaj daŭraj korespond-kursoj:

1. Gvidas senpagan 10-lecionan Esperanto-kurso en Kanado Kim Keeble.
2. Senpaga 10-leciona korespond-kurso estas daŭre havebla de Esperanto-USA.
3. Administras 3-nivelan korespond-kursaron (kun kotizoj) Doroteo Holland por Esperanto-USA.

Doroteo Holland, Usona Seksiestro

<dorothyh77@gmail.com>



Membroj fine de 2008: 52 – 45 paperaj, 7 retaj.

Komitata rajtigo: 4

Nomumitaj: 4 (Ronald GLOSSOP, Lucy HARMON, William HARRIS, Duncan CHARTERS)

Retejo:

Neraportintaj sekcioj:

La sekvaj landoj havas sekciojn sed raporto ne atingis nin. Ni indikas la membronombron fine de 2008, la nombron da komitataj lokoj je dispono kaj la nombron da nomumitaj komitatanoj:

Belgio: 10 (7+3), 1, 0

Burundio: 6 (6+0) 1, 1 (NTAHONSIGA Hasano)

Ĉeĥa Respubliko: 7 (5+2), 1, 1 (Miroslav MALOVEC)

Irano: 1, 0, 0

Katalunio: 5 (ĉiuj paperaj), 1, 1 (Pedro MARTIN)

Kroatio (KEL): 16 (5 + 11), 2, 2 (Marija JERKOVIĆ, Jagoda CALDAREVIĆ)

Kubo, 3, 0, 0 (sed estrarano ofice estas komitatano)

Norvegio: 8 (ĉiuj paperaj), 1, 0

Pollando: 20 (7 + 13), 2, 2 (Małgorzata NITKOWSKA, Magdalena TATARA)

Rusio: 6 (2 + 4), 1, 0

Svedio: 41 (33 + 8), 3, 3 (Agneta EMANUELSSON, Sten SVENONIUS, Ronald ERIKSSON)

Togolando: 0, 0, 1. (ATTIOGBE-AGBEMADON Mensaf Biova)

Ukrainio: 10 (2 + 8), 1, 1 (Nina DANILJUK)

La sekvaj havas hejmpaĝon:

Kataluna: <http://www.xtec.es/%7Epmarti10/espvers.htm>

Pollando: <http://www.ilei.pl/news.php>. Bonega, en Esperanto, inkluzive de la konferenca libro el Krakovo.

Svedio: <http://ilei.info/svedio/eo>. En Esperanto kun ligo al sveda versio.

La sekcioj estis ripete petitaj sendi raporton kaj nomumi siajn komitatanojn – ekde februaro 2009. Necesas ankoraŭ pli forte peti tion, por kompletigi la komitaton kaj pri 2009 havi pli precizan superrigardon de la sekciaj laboroj. Se sekcio sendis raporton kiu ne aperas, bonvolu send ĝin denove! Vakas ankoraŭ 11 komitataj lokoj (AU 1, BE 1, BR 4, GB 1, FR 2, NO 1 kaj RU 1). Se iuj el tiuj sekcioj ja nomumis tiujn komitatanojn, bonvolu refoje sendi tion al ni! Ni daŭre ĝisdatigos ĉi tiun dokumenton!

Viaj sugestoj kiel plibonigi la sekvan raporton por 2009 estas bonvenaj!

Laste redaktita: Sept 10, 2009, SMG